



ESPERANTO

NORMANDA BULTENO

unuigo de normandaj esperantistoj

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 02 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 7,62 Euroj Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

POLITIKAJ BALOTOJ

Dum venontaj monatoj, Francoj plurfoje voĉdonos.
Du-foje ili voĉdonos por elekti Respublikestron
Unu aŭ dufoje, ili voĉdonos por elekti deputitojn al parlamento

Politikaj opinioj de esperantistoj estas tre diversaj. Pro tio, Esperanto-Normandie kaj aliaj E - asocioj ne favoros iun aŭ alian kandidaton.

Inter la kandidatoj, multaj sin prezentas sen espero esti elektitaj sed ili deziras profiti la okazon propagandi siajn ideojn (Ekzemple, iu kandidato volas defendi ĉasadon). Iuj esperantistoj havis similan ideon : kandidatiĝi por propagandi Esperanton pere de televido, radio, ĵurnaloj, ktp Feliĉe, ili rezignis sian deziron; tio estas preferinda ĉar tio povus ridindigi Esperanton. Eĉ esperantistoj ne estus voĉdonintaj por tiaj kandidatoj !

Ni tamen pripensu pri la limoj de nia neŭtraleco. Politikistoj havas potencon en manoj kaj ili povas influi nian vivon. Do, ni ne hezitu interpelacii ilin okaze de mitingoj aŭ aliaj kunvenoj. Se la kandidato aŭ elektito elmontras sian estimon aŭ malestimon al Esperanto, ni rajtas informi niajn samideanojn pri lia deklaro.

Ofte, ni reklamas Esperanton inter esperantistoj anstataŭ klopodi kaj peni por informi aliajn homojn. Kio estas preferinde:

- ĉu mem organizi informkunvenon kiun ĉeestos nur kelkaj dekoj da homoj ?
- ĉu informi pri nia lingvo, antaŭ pluraj centoj da homoj, okaze de kunveno organizita de aliaj ?

En Rouen, ni eksciis ke okazos en fakultato pri juro prelego pri "Ŝirmado de lingva diverseco en la kadro de Eŭropa konstruado" Antaŭ pluraj centoj da studentoj, prelegistoj atentigis pri danĝero de anglo-usona lingvo kiu minacas ĉiujn aliajn kulturojn. Ni intervenis kaj sugestis uzon de komuna lingvo, facile lernebla, demokrata kaj ligita al nenia imperialismo. Nia interveno estis atente aŭskultata kaj prelegistoj eldiris sian estimon al Esperanto kvankam ili opinias ke ĝi estas "*politika utopio*". Vi legos en nia bulteno francelingvan raporton pri tiu prelego. Resume, ni profitu la balotan periodon por konigi nian idealon !

Petro KIJŬ

EN NIAJ KLUBOJ:ROUEN:

A LA FACULTE DE DROIT

Le Jeudi 28 Février, l'association européenne des étudiants en droit a organisé une conférence ayant pour thème : "La protection de la diversité linguistique dans le cadre de la construction européenne". Les orateurs étaient le Professeur de droit à l'Université de Nantes, M. Alain Fenet et M. Bernard Cassen, Directeur Général du Monde Diplomatique et président d'ATTAC. L'assistance était composée en grande partie par les étudiants. Environ 200 personnes se pressaient dans l'amphi.

Les 2 exposés étaient intéressants; les orateurs ont bien mis en lumière les difficultés linguistiques qui se posent au sein des institutions européennes et la tendance à vouloir nous imposer l'anglo-américain. M. Fenet souhaiterait que chaque député européen connaisse au moins une langue étrangère. M. Cassen expliqua les difficultés de traduction d'une langue dans une autre et la nécessité d'utiliser parfois une langue pivot pour traduire par exemple du finnois en portugais ou en grec. M. Cassen déplora l'anglisation envahissante et il souhaiterait que cette langue ne soit plus étudiée en premier. Il pense que la solution pourrait être: l'étude active (comprendre et parler) d'une ou deux langues et l'étude passive (comprendre uniquement) de quelques autres. M. Cassen a utilisé certains arguments déjà développés par des espérantistes mais sa conclusion n'était pas conséquente et il semblait ignorer la solution "Esperanto"

La parole étant donnée à l'assistance, je suis intervenu : Après avoir exprimé mon accord sur le danger d'une langue unique qui mettrait les pays non-anglophones en position de vassalisation face à la Grande Bretagne et aux U.S.A., j'ai affirmé qu'il existait une langue commune neutre liée à aucun impérialisme, que cette langue planifiée était parlée par une diaspora de plusieurs millions de locuteurs, qu'elle avait évolué comme toute langue vivante, qu'elle avait été combattue par les puissances totalitaires et ignorée dans les pays démocratiques, que les grands médias continuaient à faire silence sur son existence malgré ses congrès, ses revues, sa littérature, ses sites internet. Le 2ème intervenant fut une étudiante qui, au lieu de poser des questions aux conférenciers, déclara qu'elle ne voulait pas apprendre l'esperanto, parceque ce n'était pas une langue mais un ensemble de mots de bric et de broc non liés à une culture. Le 3ème intervenant créa la surprise car c'était un professeur d'origine italienne qui réfuta les attaques de la précédente; il appuya mes dires et insista sur la facilité de l'esperanto.

Dans leurs réponses aux intervenants, Messieurs Fenet et Cassen exprimèrent leur estime à l'égard de l'Esperanto et des espérantistes. M. Cassen dit qu'il s'attendait d'ailleurs à l'intervention d'un espérantiste, mais tout en reconnaissant le succès linguistique de la langue internationale, il regretta de devoir la considérer comme "*une utopie politique*" (ce que l'on pourrait exprimer ainsi: la langue est valable mais les hommes politiques qui nous gouvernent n'en voudront jamais !)

En résumé, notre intervention devant un public jeune et intéressé a été un succès puisqu'elle a presque monopolisé le débat et que la solution Esperanto a été traitée avec sérieux.

Petro KIJ0

ROUEN: Catherine Domingo, continue son cours d'initiation à la librairie "L'Insoumise" avec une dizaine d'élèves très attentionnés

GRAND QUEVILLY: les réunions ne sont plus hebdomadaires; elles ont lieu 1 ou 2 fois par mois
consultez P.Quillaud pour connaître les dates

YVETOT: Pierre POTTIER agas por veki la lokan grupon. Li sukcesis aperigi tutpaĝan artikolon kun fotoj en Le Courrier Cauchois

LE HAVRE:

DAGESTANON, NUN NI KONAS

Samideano Junusov ekturais de nia urbo. Li alvenis sabaton, 5an de Januaro 2002, en fervoja stacidomo, bonvenigita de Alano kaj Sylvie

Okaze de tiu semajnfino, nia klubo organizis amikajn rondojn kaj proponis al nia amiko malkovri diversajn aspektojn de nia haveno. Grava okazaĵo estis antaŭvidita lundon 7an de Januaro. Tiam nia vizitanto prezentis prelegon: "Dagestano, tero de la lastaj kavaliroj". Anoncita en loka gazetaro kaj malfermata al publiko, tiu vespero allogis fervoran esperantistan ĉeestintaron. La geklubanoj estimegis la prelegon de Abdurahman Junusov kiu pedagogie elvokis historion de tiu fora respubliko, lulilo de tiom da originaj lingvoj atestantaj migradojn de niaj eŭropaj pravaĵoj.

Ekspozicieto de dokumentoj kaj metiistaj laboraĵoj ebligis al ni konstati lertecon de Dagestanoj

Vizito de eksterlandano estas interesa spertaĵo: por klubo, ĝi plifirmigas ĉies energion, ĝi ebligas al novuloj malkovri efikon de internacia lingvo; ĝi subtenas nian agadon kaj varbadon por Esperanto montrante al gazetaro kaj publiko indecon de helpa komuna lingvo.

Sylvie CARON

Silvia serĉas tradukojn de popolaj kanzonoj aŭ francaj kanzonoj. Bonvolu konsili ŝin aŭ indiki referencojn. Antaŭdankegon. (Sylvie Caron, 44 rue Gustave Lennier 76600 Le Havre)

KOMITAT-ESTRARO de ESPERANTO-NORMANDIE Unuiĝo de Normandaj Esperantistoj
Ni memorigas al vi nomojn de ĉefaj estraranoj elektitaj la 2an de Aprilo 2000:

Prezidanto: Yves NICOLAS 17/37 Quartier du bois 14200 Hérouville Saint Clair

Vic-prezidanto: Pierre Pottier 21 allée des roitelets 76190 Yvetot

Kasisto & Bultenisto: Pierre Quillaud 16 rue Lt Vaisseau Paris, 76120 Grand Quevilly

Kunordinantoj por junuloj:

-Supera Normandio: Dominique (ino) Corrieu Chapotard 21 Avnue Rauss 76370 Berneval le Grand

-Malsupera Normandio: Yves Bachimont 14 allée du clos de la prairie 14000 Caen

NORMANDA BULTENO: Nous avons du rayer de la liste des abonnés quelques personnes qui, malgré plusieurs rappels, ne réglaient pas leur cotisation. Nous rappelons aux responsables de groupe qu'ils doivent me transmettre les noms des nouveaux membres et nouveaux élèves dès qu'ils estiment qu'ils sont capables de lire notre bulletin. Nous leur enverrons gratuitement 2 ou 3 exemplaires du bulletin.

Ensuite, s'ils désirent continuer à le recevoir, ils devront régler leur abonnement

CAEN (Union artistique et intellectuelle des cheminots de Caen) Cours oraux gratuits tous les mercredis après-midi. Adhésion à l'association: 8 Euros. S'adresser à M. André Dubois 2 rue de la Grâce de Dieu 14123 à Fleury sur Orne Tél. 02 31 82 31 45, e-mail: andre.dubois2@fnac.net
Association Française des Cheminots pour l'Esperanto (AFCE): Cotisation annuelle avec le bulletin:

- pour les cheminots: 17 euros

- pour les non-cheminots: 19 euros

Cours par correspondance:

- pour les cheminots: gratuit (à condition qu'ils aient réglé leurs cotisations à l'AFCE (17 E) et à l'union artistique (8 E))

- pour les non-cheminots: 16 Euros (+cotisation AFCE 19 E)

RAPPORTS FINANCIERS 2001

Nous vous rappelons qu' ESPERANTO - NORMANDIE regroupe l'Union des Espérantistes de Normandie ouverte à tous les espérantistes demeurant dans notre région (qu'ils soient isolés ou membres d'un club local, qu'ils soient adhérents ou non d'une autre association nationale ou internationale) et la Fédération Normande d'U.F.E. (Esperanto-France) réservée seulement aux adhérents d'UFE et d'UEA. Il n'y a aucun antagonisme entre ces deux associations dont les responsables sont les mêmes personnes.

Union des Espérantistes de Normandie CCP 283 40 H Rouen

RECETTES		DEPENSES	
Au CCP le 1/1/2001			
Cotisations et dons	3850,20	Bulletins 207 à 209	2028,80
Esperanto 50	495,49	Frais administratifs	10,50
		Propagande	486,02
		Séjour Sro Peng	118,00
Total Recettes	4345,69	Total Dépenses	2643,32
		Au CCP le 31/12/2001	
BALANCE	12102,18		12102,18

Fédération Normande d'U.F.E.

Au CCP le 1/1/2001			
Ristournes sur cotisations	728,50	Frais administratifs	91,50
		Au CCP le 31/12/2001	
BALANCE	5023,22		5023,22

Observations du Trésorier:

Les comptes sont approuvés par le contrôleur Pierre Jouvin

Les frais administratifs seraient plus élevés si les responsables " n'oubliaient" pas de compter leurs appels téléphoniques, certains affranchissements et frais de déplacements

Ce rapport devrait être approuvé lors d'une assemblée générale.

Je propose que l'abonnement-cotisation soit arrondi à 8 euros pour l'année 2003

Nos dépenses sont faibles puisqu'elles concernent surtout le bulletin; c'est le reflet du manque d'activités de notre association

Les dépenses "propagande" concernent un achat de dépliant, d'affiches et brochures utilisés pour l'ouverture d'un cours à Rouen (398,50 F) et l'aménagement d'un stand chez les radio-amateurs de Fécamp (87,52 F)

La recette "Esperanto 50" résulte de la dissolution du groupe de Saint Lo, à la suite du départ d'André Morio vers une autre région

En ce qui concerne les comptes de la Fédération, les recettes proviennent des ristournes sur les cotisations versées par les adhérents d'Esperanto-France (U.F.E.) Dans la mesure du possible, les dépenses de la Fédération devraient être liées à des activités d'UFE : Remboursements de frais pour participer à des réunions ou des délégations à des congrès

INFORMOJ LANDAJ KAJ INTERNACIAJ

ESPERANTO-FRANCE 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris Tél.01 42 78 68 86

La sidejo d'UFE estas malfermata de marde ĝis ĵaŭde de 9a ĝis 20a horo

lunde kaj vendrede de 12a ĝis 20a horo

sabate de 15a ĝis 20a horo.

SAT-Amikaro inaŭguris sian lokalon kiu situas :134 Bvd Vincent Auriol Paris 13

SAT daŭre restas 67 Avenue Gambetta Paris 20

KONGRESOJ

En la decembra bulteno, ni vin informis pri kongreso de SAT Amikaro kiu okazos dum Pasko en Vigy apud Metz

pri kongreso de SAT en Alicante (Hispanio) ,de 1a ĝis 8a de Julio

pri Universala Kongreso en Fortaleza (Brazilio) de 3a ĝis 10a de Aŭgusto

5a EŬROPA KONGRESO okazos de la 23a ĝis la 28a de aŭgusto en Verona Italio

kontakto kaj petu programon kaj aliĝilon al:

Verona Esperanto Grupo CP 1616 IT-37100 Verona.

KONGRESO de ESPERANTO-FRANCE

de la 17a ĝis la 20a de Majo (Pentekosto) en Strasburg

Kune kongresos: Esperanto-France, Esperanto-France-Est, Esperanto-jeunes (FEFO), Fédération Espérantiste du

Travail (FET), GEE (instruistoj), FKEA (katolikoj)

La programo konsistos el ĝeneralaj kunvenoj de supraj asocioj, prelego de Georges Kersaudy, koncerto de la kantisto Mōrice Benin, promenado tra Strasbourg, vizito de bierfarejo Kronenburg. Marde, okazos tuttaga ekskurso al Haut-Koenigsbourg kaj al Colmar .

Petu informojn kaj aliĝilojn al Esperanto-France

INTERNACIA ESPERANTO KONFERENCO : "Scienco kaj socio" de 20a ĝis 26a de Julio en Leuven (Belgio)

Informo: Esperanto 3000 Leuven R. Menada 44 BE-1320 Hamme-Mille

INTERNACIA KATOLIKA KONGRESO de IKUE de 17 ĝis 24/08 en Kromeriz (Ĉekio)

ALIAJ RENKONTIĜOJ KAJ STAĜOJ:

INTERNACIA SEMAJNO ĉe MEDITERANEQ de 24a ĝis 31a de Aŭgusto ĉe Maison Familiale "Le Lazaret"

en Sète (Hérault) . Aliĝilojn petu al Esperanto Culture et Progrès 5 rue du Dr Roux 34090 Montpellier

STAGE d'ETUDE à Le Croisic (44) en bord de mer du 18 au 20 Mai pour débutants et perfectionnement

contacter Hélène Vincent 3 rue Blaise Cendrars 44100 Nantes Tél. 02 40 43 92 42

KVINPETALO Centro de Bouresse (apud Poitiers)

29/04 -03/05: Botaniko

08-12/05 : Piedmigrado

09/12/05 : Ĝenerala Kunveno de FET

18 - 22/06 : altnivela lingvokurso kun muziko

09-16/07 : aktorarto kaj samtempe inicado & joko praktiko

19 - 23/07 : preparo al altaj studoj

06 - 10/08: preparado al skriba parto de ekzameno Kapableco

Oktobro : Praktikado de la lingvo 1a, 2a, 3a niveloj

Informoj: Tel/Faks 05 49 42 80 74

kvinpetalo@club-internet.fr

CENTRE DE GRESILLON

Stages d'été du 6 juillet au 15 août

Renseignements: Henri Boyer 02 41 64 91 65 ou: Paulette Naulet 02 41 82 55 22

Autres évènements:

13 Juillet: Fête moyenâgeuse

20 Juillet : Cérémonie officielle du 50ème anniversaire de "l'espérantisation " du château

Du 30/08 au 7/09 : FESTO Rencontre internationale et festive de jeunes, histoire de voir l'Esperanto en action

INTERNET

Cours en ligne gratuit avec correcteurs, assuré par Esperanto Jeunes sur le site:

www.esperanto.org

6emes RENCONTRES INTERNATIONALES à Plouezec (près de Paimpol)

du 17 au 24 Août

s'adresser à Louise RIGAULT 4 route de Kervor 22470 Plouezec Tél. 02 96 22 70 13

andre.rigault@wanadoo.fr

La 6-aj Pluezekaj Renkontiĝoj

La Internaciaj Renkontiĝoj de Pluezek, urbeto de Bretonio (en Francio) iĝis pli kaj pli grava evento en Esperantio. Okaze de la kvinaj Pluezekaj Renkontiĝoj en aŭgusto 2001, jam estis pli ol 170 partoprenantoj el 11 landoj, kaj tiu partoprenantaro ĉiujare plimultiĝas !

La programo de la Pluezekaj Renkontiĝoj estas ja riĉa. Matene, okazas Esperanto-kursoj por ĉiuj niveloj, kun spertaj instruistoj el diversaj landoj. Vi povos elekti inter 4 niveloj, kaj estos eĉ kurso porinstruistoj. Por la infanoj, estos 2 kursaj niveloj.

Posttagmeze, multaj distraĵoj estas proponataj : turismumado en tiu belega regiono Bretonio, danco, ĥorkanto, joko, teatro, Interreto...kaj eble eĉ kurso pri la bretona lingvo.

Ĉiuvespere, estas antaŭvidata kabaredo kun kulturaj eventoj : bretonaj dancoj, prelegoj, maristaj kantoj, kabared-teatro,ktp. Ĉiuj proponoj bonvenas. Tia kabaredo estos interesa animaĵo ĉefe por la junuloj, kiuj povos tiel festumi dum la tuta vespero !

Je la fino de la staĝo, la plej laboremaj povos trapasi Esperanto-ekzamenojn (1-a aŭ 2-a nivelo). Estas bona okazo por mezuri sian Esperanto-nivelon.

Do, nepre partoprenu tiujn sesajn Pluezekajn Renkontiĝojn por malkovri tiun ĉarman bretonan urbeton tre proksiman de tiu de Obeliks kaj Asteriks, por amuziĝi, por plibonigi vian Esperanto-nivelon, por trapasi ekzamenojn, por partopreni simpatiajn vesperojn kun bonaj amikoj... Tiom da kialoj por partoprenigi vin al tiu agrabla renkontiĝo, kiu okazos de la 17- ĝis la 24-a de aŭgusto !

Les 6èmes Rencontres de Plouezec

Les Rencontres Internationales de Plouezec, petite ville de Bretagne (en France), sont devenues un évènement de plus en plus important dans le monde esperantophone. Lors des 5èmes Rencontres de Plouezec en août 2001, il y avait déjà plus de 170 participants de 11 pays, et ce nombre ne cesse d'augmenter chaque année !

Le programme des Rencontres de Plouezec est très varié. Le matin, des cours d'espéranto pour tous niveaux, avec des professeurs compétents venus de plusieurs pays. Vous pourrez choisir entre 4 niveaux, et il y aura même un cours pour apprentis professeurs. Pour les enfants, il y aura 2 niveaux de cours.

L'après-midi, plusieurs activités seront proposées : tourisme à travers cette magnifique région de Bretagne, danse, chant choral, yoga, théâtre, Internet...et peut-être même un cours de breton (en espéranto). Chaque soir, il est prévu une sorte de cabaret avec des animations culturelles : danses bretonnes, conférences-discussions, chants marins, cabaret-théâtre, etc. Toutes les propositions sont les bienvenues. Ce "cabaret" intéressera notamment les jeunes, qui pourront ainsi faire la fête pendant toute la soirée ! A la fin du stage, les plus travailleurs pourront, s'ils le veulent, passer des examens d'espéranto (1er ou 2ème niveaux). C'est une bonne occasion pour évaluer son niveau en espéranto.

Donc, venez absolument à ces sixièmes Rencontres de Plouezec pour découvrir ce charmant village breton très proche de celui d'Asterix et Obélix, pour vous amuser, pour améliorer votre niveau en espéranto, pour passer des examens d'espéranto, pour participer à des soirées intéressantes avec de bons amis... Autant de raisons pour vous faire participer à ces rencontres à l'ambiance très sympathique, qui aura lieu du 17 au 24 août 2002 !

Si vous souhaitez d'avantage d'informations sur le stage ou si vous voulez vous inscrire : contactez Louise RIGAULT : 4 route de Kervor, 22470 PLOUEZEC ; tél :02 96 22 70 13

Sébastien Erhard

Pedagogia kaj kultura animanto por la asocio "Esperanto 22" / Animateur pédagogique et culturel pour l'association "Espéranto 22"

Regiona kunordiganto de Bretonio por la asocio JEFO / Coordinateur régional de la Bretagne pour l'association "Espéranto-Jeunes"

DANKON NORMANDIO !

Antaŭ 2 jaroj, mi konatiĝis kun S-ro Yves Nicolas el Hérrouville. Tio okazis dum la E-tendaro en Tiĥvin apud S-Peterburgo en Rusio. Ni kune partoprenis la jubileon de nia komuna amiko Mikaelo Bronŝtejn.

Pasis tempo kaj surprize mi ricevis proponon de Yves Nicolas fari prelegvojaĝon en Francio. Mi ĝoje kaj dankeme konsentis prelegi en bela Francio !

Kaj jen, post longaj preparadoj kaj multaj zorgoj de Yves la vojaĝo efektiviĝis. Post la Internacia Festivalo, la novjara aranĝo en Germanio, ges-oj Gabalda afable veturigis min de Magdeburgo al sia domo, kaj matene - al la stacidomo en Parizo. Mia prelegvojaĝo komenciĝis la 5an de januaro en Le Havre, - la pordego en Eŭropo, kiel estas skribite sur la turo. Por mi ĉi urbo iĝis pordego al Francio ...Min afable renkontis Sylvie Caron kaj Alain Chalm. Mi enloĝiĝis en hotelo en centro de la urbo, kaj poste ni vizitis ges-ojn Jean kaj Yvette Gibaux. Estis agrabla bela akcepto kun bonegaj vinoj kaj fama armanjako, kaj post la promeno, ni vespermanĝis en restoracio, kie mi gustumis verajn por mi ekzotikaĵojn : ostrojn, litorinojn (*bigorneaux*), bukencojn (*bulots*), krabon...

Okazis multaj ekskursoj, kaj Sylvie, bonege, tre interese, rakontis pri sia urbo, ĝia historio. Mi ofte rememoras kiel ĉarme ŝi ridetis, rakontante historiojn... Estis vizitoj al afablaj ges-oj Maurice kaj Christiane Huet. Ankaŭ kun Alain kaj lia amikema hundo Urka ni promenis; kun Alain ni vizitis la katedralon (kie, interalie, estas lia arta manlaboro el arĝento) kaj muzeon pri artoj. Poste, ni vizitis f-inon Simone Séry, kaj dum la tagmanĝo parolis pri diversaj problemoj de la nuntempa vivo.

S-ro Gibaux donacis al mi kelkajn bonajn librojn en Esperanto, pro kio mi estas tre dankema al li !

Post mia prelego pri mia lando Dagestano, ĝia historio, arto kaj nuna situacio en ĝi kaj en la najbaraj respublikoj, gesamideanoj kolektiĝis en vjetnamia restoracio. Matene, s-ro Maurice akompanis min al la busstacio kaj mi traveturis belegajn urbetojn de Normandio. Kvazaŭ tio okazus en iu fabela lando !

En Caen, mi, verŝajne pro abundaj impresoj, perdiĝis ; sed Gérard Sénécal, mia gastiganto, lerte trovis min. Post la tagmanĝo, ĉe Gigi kaj Gérard ni promenis laŭ la marbordo, kolektante konkojn. Ni vidis la belan romanstilan katedralon, rigardis la kastelon kaj poste renkontiĝis kun Yves Nicolas kaj kun mia pariza kolego kaj amiko Nicolas Ebnoter, ĵurnalisto kiu dufoje vizitis Dagestanon kaj faris televidan filmon pri la problemoj de Kaspia maro. Vespere, ĉe Yves Nicolas kolektiĝis la samideanoj kaj la gvidantinoj de la urba biblioteko en kiu devis okazi la prelego. Yves Nicolas daŭrigis seriozan preparadon.

Matene, ni vizitis la Kristanan Radion Francan. Oni intervjuis min kaj Nikolaon Ebnoter; Yves Nicolas flue interpretis. Posttagmeze, venis ĵurnalisto de alia radio kiu ankaŭ intervjuis. Poste ni vizitis la lokan televidon kaj iris al la biblioteko por prelegi. Sed antaŭ la prelego okazis ankoraŭ intervjuo por la televido kaj por gazeto. Vere Yves serioze prepariĝis !

Post la prelego, kiun partoprenis ankaŭ Nicolas Ebnoter, sekvis pluraj demandoj; N.Ebnoter montris interesajn lumbildojn, kiujn li faris dum la vizitoj al Dagestano.

La morgaŭan matenon, min akompanis tre interesa homo, S-ro Jean Magerel, kun kiu ni veturis al Bayeux kie ni rigardis belan katedralon, tagmanĝis en restoracio, trinkante vinon kaj kalvadoson. Ni promenis en la urbo, veturis al Arromanches, la historia loko ligita kun la 2a mondmilito. Kaj estis tre interese paroli kun s-ro Jean Magerel pri literaturo, pri domo, pri gravaj problemoj de la homaro.

Li afable akompanis min ĝis la trajno kaj mi forveturis, portante multajn impresojn pri bela Normandio kaj ĝiaj gastemaj ĉarmaj homoj.

Mia prelegvojaĝo daŭras; ŝanĝiĝas urboj, domoj sed mi ne forgesas la unuajn renkontojn en Normandio.

Dankon, kara Yves Nicolas, dankon samideanoj el Normandio !

Amike

Abdurahman JUNUSOV

mia adreso : RU - 367000 Maĥaĉkala, ab.k. 74 Dagestan Rusio Tél.+7-8722-630643
Rete: junusov@dagestan.ru

*Le prochain numero de Normanda Bulteno paraŭtra fin juin
Envoyez moi vos articles au plus tard le 15 juin*

Petro

ADIAŬ FRANCA FRANKO

La 5an de decembro 1360, en urbo Compiègne, reĝo Jean le Bon "elpensis" la moneron "Franko". La bildo sur tiu bela peza monero montris la reĝon rajdante ĉevalon kaj svingante spadon. Kial tiu monero estis nomata "Franko"?

Tiam, la reĝo estis ĵus liberigata de angla reĝo Edouard III, kiu, okaze de la centjara milito, enprizonigis lin dum 4 jaroj. Sed por esti liberigata, la kaptito devis pagi ostaĝmonon: 3 milionoj da "livres tournois" (turnirpundoj) kiu estis la tiama mono, samvalora al 12,5 tunoj da oro.

La reĝo skribis: "Nous avons été délivré à plein de la prison et sommes *franc* et délivré à toujours" (*mi estis entute elprizonigita kaj estas libera por ĉiam*). Pro tio ke tiu mono igis la reĝon "franc", tio estas libera, oni nomis ĝin "franko"

La franko de Jean le Bon pesis 3884 mg da fajna oro. Dum regado de Napoleono, ĝi valoris 290 mg, dum la 2a mondmilito: 21 mg; dum prezidanteco de Georges Pompidou: 1,6 mg.

La novaj moneroj "Eŭroj" estas grandparte el kupro kiu laŭdire estas kontraŭbakteria. Oni diras ankaŭ ke ĝi havas mirindajn terapeŭtikajn kvalitojn. Memoru la kuprajn brakringojn kiuj iuj vendas kontraŭ reŭmatoj!

EI TELERAMA

Tradukis Suzanne Helbert

VOJAĜO AL MALIO (Okcidenta Afriko)

La 2an de Februaro, sesope (kun edzino kaj geamikoj) ni forflugis al Malio per Air - France kompanio. La kvarmilkilometra vojaĝo daŭris proksimume 5 horojn sed horaroj ne estis respektataj (Por iri, ni atendis 4 horojn antaŭ ekflugo; por reveni pli ol 2 horoj)

Februaro estas la vintra sezono. Tamen temperaturo estis 30 gradoj tage kaj 18 nokte. Hordiferenco kun Francio estas malpli ol 1 horo.

En Bamako, ĉefurbo de Malio, ni loĝis ĉe niaj amikaj gastigantoj. Ili estas ge-Afrikanoj vivantaj en Francio: ŝi depost 20 jaroj; li depost 30 jaroj

En ilia domo, estas elektro, duŝejo, necesejo, dormĉambro kun lito (ni ne dormis sur tapiŝoj), ŝranko, plafon-ventumilo: ni estis preskaŭ privilegiuloj!

Pri nutrado, ni singarde manĝis diversajn nutraĵojn. Ni prenis per la dekstra mano en la unika plado. Tamen, plej ofte ni uzis teleron kaj forketon, kiel ĉe ni.

Tri punktoj maltrankviligas landgvidistojn: unue: la instruado, due: la sano, trie: la sekeco (dezerto progresas po 1 kilometro jare)

Plej stranga sperto de nia vojaĝo estis la vizito de naskiĝvilaĝo de nia amiko. Ni tien veturis trajne. Normale, ni devis veturi 560 kilometrojn en 12 horoj sed tri horkvaronojn post enrajniĝo, okazis paneo de lokomotivo. Ni atendis pli ol 3 horojn sub arda suno, sen aerblovo! La fervojo estas unika (ambaŭdirekta); do ni devis ofte atendi la trajnon kiu venis de alia direkto. Estis 23 stacioj kie trajno haltis; dum haltoj, venis vendistoj al kiuj oni povis aĉeti nutraĵojn kaj manfaritajn produktaĵojn; ĉiam necesis marĉandi (tiu kutimo ne plaĉas al mi) Ĉiuj ĵetis rubojn...trans fenestrojn: paperoj, fruktselaĵoj, plastboteloj, ktp... Post trajno, ni ankoraŭ veturis aŭtobuse 150 kilometrojn. Bruo estis pli laŭta ol diskuto pro malbona funkciado de bremsa. Frumatene, vilaĝanoj akceptis nin kaj loĝigis nin en la sola domo konstruita el aglomeraĵoj kun litoj en ĉambro (la solaj mebloj) Tagmeze, homoj prezentis al ni ŝafon por meŝŭio. Manĝo, necesa siesto dum pli forta varmo, vilaĝvizito, teoceremonio... Vespere estis la "oficiala" akcepto. Paroladoj, gratuloj, omaĝoj, prezentado de niaj donacoj (ni kunportis lern-materialojn kaj medikamentojn), dankoj. ktp...La sekvantajn tagojn, ni vizitis la tute novan lernejon (muroj kaj tegmento el arbfolioj, tamen bone varmizolata). La instruisto faris plurajn demandojn al junaj lernantoj.

La vilaĝo ne havas elektron; motoro produktas energion por akvorezervujo. Nur 3 kranoj por ĉerpi akvon.

Telefono estis instalata antaŭ unu jaro. Je distanco de 10 km, oni ne trovas kuraciston, sed nur flegiston. Ne estas aŭtomobilo sed nur kelkaj bicikloj kaj motorbicikloj. Granojn ili dispremas en pistujo.

La vilaĝanoj ne aspektas mizeraj. Ili estas ofte gajaj kaj ofte ridas. Tamen por ni, vidi tiajn vivkondiĉojn premas la koron. La vera ŝanco por tiuj homoj estas asocio Francio-Malio. Kelkaj vilaĝanoj laboras en Francio kaj subtenas per kotizoj la asocion kiu aĉetas necesajn aferojn kaj pagas alian (ne registaran) instruiston.

En Francio, vivas 270.000 ge-Malianoj.

Ankaŭ ni vizitis la urbon Segou kie naskiĝis nia amikino. La reiro ĝis Bamako daŭris 24 horojn. Car la buso paneis. Ili eĉ ŝanĝis unu el la radoj

En Bamako, ni vizitis du muzeojn kaj ni povis komuniki kun konatuloj per interreto. Ni konstatis entuziasmege kiam Malio gajnis futbale.

Mi ne skribas pri problemoj kiuj speciale koncernas virinojn: poligamio, ekscizo, aideso, tradicioj, kredoj....

Jen resumitaj impresoj pri laciga vojaĝo al lando kiun mi plezure vizitis sed kie mi ne ŝatus vivi kvankam homoj tie feliĉe vivas malgraŭ tre malfacilaj vivkondiĉoj.

Dominique LEROY

(Grupo de Grand Quevilly)



ESPERANTO NORMANDA BULTENO

unuiĝo de normandaj esperantistoj

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 02 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 50 Frankoj. (7,62 Euroj) Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

REPRISE DES ACTIVITES

Tous les clubs espérantistes ont repris leurs activités durant le 4ème trimestre de l'année. Les vacances ont été la période propice pour l'organisation des grands congrès, des stages et de toutes autres manifestations internationales. Ces rencontres mondiales ont été l'occasion pour échanger des idées, faire connaissance avec des étrangers et ainsi constater la valeur et l'utilité de l'Esperanto, conserver l'enthousiasme nécessaire pour faire connaître, pratiquer et enseigner la langue internationale.

Nous sommes convaincus de la valeur de l'Esperanto parce que nous l'avons utilisé. Nous sommes énervés et même révoltés de constater que grands médias, décideurs et hommes politiques refusent de tenir compte que l'Esperanto est la meilleure solution au problème de la communication internationale.

Les actions que nous menons devraient être méthodiques, persistantes et diplomates. Ne croyons pas avoir convaincu grand monde parceque nous avons réussi à faire paraître un article dans le journal local si cet article reste sans suite. Evitons aussi une trop grande insistance qui peut provoquer des réactions du genre : "Il nous embête celui-là avec son esperanto !" Evitons les maladresses qui neutralisent nos efforts. Si nous avons la possibilité de tenir un stand ou d'exposer dans une vitrine, ne présentons que des documents, des revues et des livres récents. De vieux livres jaunis et écornés, des tracts anciens, des informations périmées, des brochures éditées ente 1910 et 1930 sont à proscrire absolument. Ne faisons pas de contre-propagande; ne faisons pas passer l'Esperanto pour une vieillerie.

Sous l'impulsion des jeunes de JEF, il existe maintenant une gamme d'articles de publicité bien faits, en couleurs, mis à jour régulièrement : dépliants, brochures, dossiers d'information, panneaux, affiches, autocollants, etc...Recevez gratuitement le catalogue "Promotion - Communication" d'Esperanto - France en le demandant au 01 42 78 68 86 (ou Fax 01 42 78 08 47) ou consultez le sur le site WWW.esperanto-france.org rubrique aktivuloj. Ces documentations peuvent vous être utiles si quelqu'un vous écrit : "J'ai entendu parler de l'Esperanto. Pouvez vous me renseigner ? " Aux documentations, il serait bon de joindre quelques revues de bel aspect. N'ayons pas l'air miséreux!!!

Les clubs qui encaissent des cotisations peuvent commander et régler du matériel de publicité mais comment peut faire un espérantiste isolé qui désire fonder un groupe ? Esperanto-Normandie